BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara esperantista asocio

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922.

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.
Anonctarifo: 1 kv. cm. — 1 levon;
korespondo: 1 vorto — 1 levon. Por fremdlando — duoble. Poŝtĉekkonto No 1133
Adreso: str. Alabin, 50. SOFIA, Bulgario.

Jaro XVIII **Novembro-Decembro 1936** **3-4**

ATENTU
la novan adreson!

MONTO RILA,

la plej]alta en la Balkana duoninsulo
Supro „ORLOVEC".

Foto M. Krâŝnjak



BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Bondeziras al siaj membroj kaj abonantoj de „Bulgara esperantisto“

FELIĈAN NOVJARON

Karaj samideanoj, vi duobligu viajn fortojn, por ke dum la nova jaro ni antingu pli da sukcesoj!

Samtempe vi ne forgesu sendi tuj vian novjaran donacon por nia esperanto-domo!



Ĉu ni progresas?

Tre ofte mi aŭdas la demandon: „Kiel marŝas la esperanto-movado“?

Certe tiu ĉi demando estas direktata ankaŭ al ĉiu alia esperantisto.

Ordinare ni respondas: „Bone. Ni marŝas antaŭen“.

Sed kia estas, vere, la stato de la movado? Ĉu ni prave respondas?

Efektive, la movado esperantista marŝas senĉese. Eble ne tre rapide en iuj periodoj. Kaj tamen ĝi progresas. Ĝia universaleco ofte malhelpas senti senpere ĝian vivecon kaj vidi ĝiajn elmontrojn. Se en iu lando ĝia intenseco malgrandiĝas, aliloke aperas pli forta agado. Simile al fajro, brulanta sur vasta surfaco.

Kia estas la diagnozo por nia *enlanda* movado?

Dirite mallonge: sufiĉe granda nombro de esperantistoj — tre limigita nombro de *organizitaj* esperantistoj. La sciantoj de la lingvo plimultiĝas konstante. Pli ol 60,000 ekzempleroj de esperanto-lernolibroj estas jam disvenditaj en Bulgarujo. Tio estas tre impona cifero por niaj cirkonstancoj, por la malmultenombra loĝantaro de nia lando.

Al kio estas ŝuldata tiu ĉi stato? La kaŭzoj estas pli ol unu. Unu el la ĉefaj, tamen, restas la malinklino al organizita vivo, al komuna laboro, al disciplino. La troa individuemo de la plimulto el la esperantistoj.

Se ni deziras, ke niaj penoj kaj laboroj donu pli grandajn rezultojn, ni devas energie kontraŭbatali tiun ĉi difekton, ni devas ĉiel akceli ĉiujn samideanojn, ke ili eniru en la lokajn grupojn kaj, per ili, en la landan asocion.

Ni progresas, vere. Sed nia progreso estus dekoble pli forta, se ni ĉiuj eklaborus *organizite*.

Ada

Както народниятъ литературенъ езикъ по отношение на диалекта има народно-обединителенъ характеръ — да сближи народа отъ разнитѣ далечни краища, така есперанто има сжщата тенденция — да сближи народитѣ отъ разнитѣ краища на свѣта. По отношение на него родниятъ езикъ е единъ видъ националенъ диалектъ. Обстоятелството, че отъ день на день есперанто печели много привърженици по всички части на земята, които се сношаватъ безпрепятствено, че има създадена на този езикъ литература, библиотека, научни лаборатории, университети и пр. показва, че той има условия и жизнени сили, които го крепятъ и **затова ще живѣе**.

Проф. П. ЦОНЕВЪ

ODESUS*)

Ĝi estis en ia antikva jarcent' —
al bordoj danĝeraj, malpacaj,
tra maroj — portataj ĉi tien de l'vent'
piratoj, maristoj, vaguloj senlacaj
invadis per ŝipoj aŭdacaj.
Kaj urbo elkreskis fortika el ŝton',
sentima en sangaj militoj,
per oro, per ruzo, per bon' kaj malbon'
kronita de siaj infanoj harditaj
reĝino de l' maraj civitoj.
El gloro antikva nur restis ruin'!
Sed staras la urbo senmorta
sur bordo en sia ornam' de reĝin',
kaj ĝia eterna sopiro senvorta
al landoj al foraj sin portas.
Sub ĝiaj piedoj eterne la mar'
per ondoj kantantaj enĥore
jen bolas en ŝaŭmo, jen brilas en klar',
jen muĝas kolere, jen flustras minore
lulkanton teneran sonore.
La ŝipoj fremdlandaj en ĝia haven',
pasintaj tra ŝtormoj kaj plagoj,
ebriaj en brua senzorga festen',
rakontas al urbo pri migroj kaj vagoj
kaj ĝoje salutas per flagoj.
Kaj tie tra stratoj multrasa popol'
multlingve marĵandas kaj krias.
la oro ĝin logas per lum-aŭreol',
kaj floras sub ĝia brilado magia
malnova dolor' nostalgia . . .
Sed vane sin vekas en sango sopir' —
forflugi al mond' ne permesas
fer-monstro en ĉi labirint' sen elir'!
Nur maro eterne rezigne karesas
la revojn de l' urbo Odesus. **Miti**

*) Odesus—antikva nomo de Varna.

* * *

(bulgara popolkanto)

Malsanadas junulino
Malsanadas tri monatojn
jen suferas, jen malĝojas
jen malĝojas pri l'amato.
Alparolas junulino —
Knabineto sian panjon:
„Vi alvoku mian knabon.
por lin vidi poste morti".
Juna knabo tuje venis,
ŝi lin vidis ŝi lin kisis,
lin mallaŭte ekparolas:
„Mi pro ci hodiaŭ mortas".
Ŝi parolon nefindiris,
tuje junknabino mortis.

Tradukis: **Iv. Dobrev**

* * *

(Bulgara popolkanto).

Knabino juna kaj bela,
ne iru frue al puto,
dum tiuj noktoj infernaj
laŭ tiuj kotaj vojetoj,
ĉar vi ankoraŭ naivas
iu povas vin renkonti,
malbonon al vi li faros.
— Ne zorgu pri mi vi, kara,
pri mi vi restu trankvila
nu venu, venu vi hejmen
sur korton nian ebenan,
hejme fluas tri fontanoj,
sur la fontanoj — tri nestoj,
en nestoj — tri najtingaloj.
L' unua kantas vespere:
Nu vespermanĝu, du junaj,
Kuŝiĝu poste, du junaj.
La dua kantas meznokte:
Vekiĝu jam vi, du junaj
Ĉirkaŭpreniĝu, du junaj
La tria kantas matene:
Leviĝu, levu vin, junaj
du junaj needzigitaj.
Ĉar iu povas vin vidi,
al tuta vilaĝ' rakonti.

Tradukis: **Iv. Dobrev**

Hristo Jasenov

* * *

Mi amas la silenton de la matenoj blanka
kaj brilon la arĝentan de l'roso sur verdaĵ:
mi amas la malhelojn de l'noktoj surfalantaj
kaj ankaŭ la fabelojn pri stranga stelmiraĝ.

Mi amas la printempon kaj ĝiajn idojn ĉarmajn,
mi amas ankaŭ plendan malgajon de l' aŭtun'
sed amas la minacon de la tempest' alarma
kaj la knabinon pacan kun ŝia ĝena jun'.

Kaj ĉiam sorĉebria, mi amas teron zuman—
min mem — kaj vin — kaj Dion-reganta mondon Fort —
kaj mia amo estas pli pura ol la luno,
kaj mia amo estas pli forta ol la mort'.

Tradukis: **Steki**

Nikolaj Rajnov.

* * *

La kantisto alrigardis la Monton kaj diris al ĝi per milda peto:

— Donu al mi, Monto, donu al mi vian animon! Via animo estas kvieta, kaj bunta, kaj ĉieloza! Mi bezonas animon de Monto, por ke mi elkantu al la mondo miajn mildajn kantojn, en kiuj dormetas la ejo, kiun ĉiu prirevas! — Donu al mi, Monto. donu al mi vian animon!—

Kaj la Monto donis al la kantisto sian animon.

Kaj la kantisto ekkantis al la mondo siajn kantojn, buntajn kiel malkvietaj papilioj, silentajn kiel flustro de arbaraj floroj, ekpensigitajn kiel susuro de klara torento, serenajn kiel monta ĉielo.

Kaj oni aŭdis ilin. Kaj oni ekŝatis ilin.

Sed la kantisto diris al si:

— Vere mi ne scias, kial oni ŝatas miajn kantojn! En ili ne estas tempesto. Kaj bela estas nur la kanto, en kiu floras tempesto kaj kriegas furioza alfluo. Kaj mia animo estas milda, ĉar ĝi estas animo de Monto. Mi ne havas mian animon . . .

Kaj la kantisto ekpensis.

— Kaj li alrigardis la Maron kaj diris al ĝi per timema peto:

— Donu al mi, Maro, donu al mi vian animon! Via animo estas uragana, kaj ŝaŭmanta, kaj plena je buntaj trezoroj! Mi bezonas animon de Maro, por ke mi elkantu al la mondo miajn tempestajn kantojn, en kiuj brilas la insulo, kiun ĉiu prirevas! — Donu al mi, Maro, donu al mi vian animon! —

Kaj la Maro donis al la kantisto sian animon.

Kaj la kantisto ekkantis al la mondo siajn kantojn, fierajn kiel blanka pinto de tempesta ondo, furiozajn kiel dispelo de buntaj gutoj, malvarmajn kiel verda marprofundo, belajn kiel diamanto de vasta marspaco.

Kaj oni audis ilin. Kaj oni ŝatis ilin.

Sed la kantisto diris al si dua foje:

— Vere mi ne scias, kial oni ŝatas miajn kantojn! En ili ne estas mistero. Kaj bela estas nur la kanto, en kiu flustras mistero kaj parolas intima sopiro. Kaj mia animo estas tempesta, ĉar ĝi estas animo de Maro. Mi ne havas mian animon . . .

Kaj la kantisto ekpensis duafoje.

Kaj li alrigardis la Virinon kaj diris al ŝi per kvieta peto:

— Donu al mi, Virino, donu al mi vian animon! Via animo estas mistera, kaj pasia, kaj plena je sopiroj! Mi bezonas animon de Virino, por ke mi elkantu al la mondo miajn sekretajn kantojn, en kiuj flirtas la rideto, kiun ĉiu prirevas! — Donu al mi, Virino, donu al mi vian animon! —

Sed la Virino ekrigardis la kantiston kun doloro kaj ŝiaj okuloj larmis . . .

Ĉar ŝi povis nenion doni al li.

El bulgara lingvo tradukis **G. H.**

Sv. Minkov

Talismano

Hodiaŭ estas restinta nur griza muro, kovrita per korvoj, unu sekiĝinta puto kaj apud ĝi — du maljunaj, altaj poploj.

Sed iam alta ŝtonkonstruaĵo staris tie-ĉi kiel roko, hazarde salinta meze de la kampoj. Prireme morante ĝin, antaŭ mi elstaras la apenaŭ koncepteblaj rebriloj de tiuj malgajaj figuroj, kiuj rigardas la ĉielon elpost feraj kradoj.

Mi kaj la alia gardisto, Jon Ĉurila, paŝas tra la mallumaj koridoroj. Niaj pezaj paŝoj krakas tra la ŝtonpavimo kaj tondras al la oreloj de la malliberigitoj.

Rostaj ferpordoj kun trueto en la mezo. Jufoje ni enrigardas post ili kaj ĵetas rigardon al la ĉeletoj. La kondamnitoj staras ĉe la muro kaj rigardas terure tiun-ĉi spionantan okulon, kiu legas iliajn pensojn kaj premas iliajn animojn.

Mi elpoŝigas dikan ŝnuron da ŝlosiloj, prenas unu el ili kaj malfermas unu pordon.

Homo levas kapon el la ĉifonmatraco en la angulo kaj milde demandas per raŭka voĉo:

— Onklo Ignat, ĉu estas ia novaĵo?

Lia velkinta barbiĝinta vizaĝo havas lacan mienon, liaj lipoj estas maldikaj kaj sensangaj, liaj okuloj — fajrokarboj.

— Ne estas, — mi respondas seke, lasas la pecon da pano kaj la kruĉon da akvo kaj eliras eksteren.

La ŝlosilo knaras dufoje.

La homo leviĝas kaj staras apud la fenestro.

Unu tagon antaŭ lia ĉelo haltas du homoj.

Mi malfermas denove la pordon kaj ili eniras internen.

La unu el ili estas malgranda, kompakta hometo kun ruĝa vizaĝo kaj maldensaj lipharoj. La alia — alta kaj malafabla — silentas dum la tuta tempo.

La hometo demetas malrapide siajn gantojn, ĉirkaŭrigardas lace la ĉelon kaj la malliberigiton, poste li elpoŝigas ian paperaĵon kaj legas aplombe kaj fiere:

— Jes... je morto... per pendigo...

— Ĉu vi diros ion? — li demandas.

Sed la kondamnito ne respondas.

Li rigide staras, liaj okuloj estas malklaraj, nur liaj lipoj ektremas kaj lian flavan vizaĝon kovras purpuro.

— Do . . . nenio . . . parolas la hometo.

Ni eliras.

Forpasas tago post tago — ŝtuparo da horoj, tra kiu malsuprenvenas la morto.

La kondamnito sekiĝas kiel arbo, formanĝata de vermoj.

Li ne manĝas, ne trinkas. Li staras tutan tagon kaj tutan nokton ĉe la fenestro, atendante la teruran minuton. Liaj okuloj erarvagas tra la ĉielo. Ili serĉas la Sinjoron, preĝas al la anĝeloj, al la diablo — al ĉio. Lia hararo forfloras malrapide kaj griziĝas.

Unu nokton, kiam la malliberigitoj dormas, mi kaj Jon Ĉurila eliras en la korton.

La suproj de la poploj estas enigitaj al la flava disko de la luno. La vento lulas tiujn—ĉi grandajn arbojn, elkreskintajn kiel fantomoj. La sitelo de la puto knaras.

Ni fosas. Niaj brakoj h.k s tra la aero, a fosiloj rompas la teron.

Ĵon Ĉurila ridas.

— Oni diras, ke la ŝnuro de pendigita homo portas feliĉon. Ĉu vi kredas- Ignat? i

Kaj kuraĝigite per siaj vortoj, li en gas la fosilon per la tuta forto.

— Vidu, — mi diras kaj manmontras, — vidu lin, li ree staras apud la fenestro.

Ni ĉesigas la laboron por momente kaj alrigardas unu el la kradoj de la malliberejo.

Blanka vizaĝo trinkas la lumon de la luno.

— Ĉu li konjektas? — parolas Jon.

— Kiu scias? — mi rediras

Ni relevas la fosilojn. Poste ni altrenas du trabojn kaj enigas ilin en la fositajn kavojn.

Jon Ĉurila komencas najli.

La frapoj reeĥos tra la nokto kaj disŝiras la silenton.

Dormemaj figuroj elkreskas apud la kradoj.

— Ho-o-o! Kiun vi pendigos! — iu krias.

Meze de la korto elstaras pordo. La korpo de la kondamnito pendos sub ĝi kaj lia animo pasos transen.

Frumatene en la ĉeleton eniras tiu malgranda hometo kaj unu pastro.

La kondamnito tremas. Lia vizaĝo estas grlza kiel la tero, liaj palaj lipoj estas krevintaj kaj sur ili malhelas guto da sango.

La hometo legas denove:

— Je morto . . per pendigo. . .

La pastro levas la krucifikson, foliumas la evangelion kaj parolas:

— Konfesu vian animon, mia filo!

Momente la kondamnito silentas kun vizaĝo grimacanta pro turmento kaj teruro, poste li falas surgenue, ĉirkaŭ brakas la piedojn de la konfesprenanto kaj kriegas per sufoka voĉo:

— Mi mortigis lin!... Mi mortigis lin!

Li elŝiras la krucon en la manoj de la maljunulo, premas ĝin al sia brusto, fiksas lipojn al la evangelio kaj ĝin kisas longe, kvazaŭ li volas fortrinki ĝian tutan saĝecon antaŭ sia morto, kaj la sangoguto rampas tra la flaviĝtnta paĝo... li vidas. . . jes, jen tie momente eklumas kaj estingiĝas la figuro de la Savinto.

(Daŭrigota)

La verda rondvojaĝo

Rapidema hundino, blindajn hundojn naskas.

(bulgara proverbo)

Vere, Bulgara esperanto-asocio ne rapidis, sed mi tro rapidis kaj tial okazis laŭ la proverbo.

Nun mi raportas pri mia verda rondvojaĝo en Bulgarujo.

Pazarĝik. Entuziasmegaj samideanoj — vere, mi imagas ekstazajn orgiojn arangôtaj kaj atendotaj por la venonta bulgara esperantista kongreso. Babiladoj, vino, virino, gazetoj kaj ceteraĵoj . . . tute malgrandaj teknikaj aferetoj, ekz. kiel salono, aperas kaj mi devas foriri de Pazarĝik kontentiĝinta je la vere amika gastiĝado sen . . . prelegado. Reveno estas fiksita por alia semajno.

Plovdiv. Oni rifuzis min. Kiu mi estas? Kial mi sinturnas al esperantistoj kaj ĝenas ilin? Kial asocio nenion avertis pri mi? Konsilas. Sinturnu al la legejo, strangulo. Sed mi tion ne sciis. Mi venis, vidis kaj venkis . . . kaj vere diablan kaoson mi kaŭzis.

Ja s-ro „Arĝento" de la banko estis dolĉa persona amiko kaj ofte kuraĝigis min. La impreso de plovdivaj klerigadaŭtoritatuloj pri esperanto restis tre bonaj.

Asenovgrad. Kvankam oni multe deziris kaj invitis, sed kiel deca junedzino lastmonate ekhontis.

Ĉirpan. Kompatinda sola esperantisto enkarcerigita inter tinkturbotelaro. Pere de mi ekscias, ke lia bona amiko same estas esperantisto. Jen kiom profunde oni estas esperantistoj . . . La aranĝojn sur sin prenas la juna direktoro.

N. Zagora. Invitas min gastigi, kaj vere mi havis en tiu urbeto anglajn kristnaskojn, ĉiutage manĝante meleagraĵon. Kotego. Sukcesa parolado antaŭ gegimnazianoj. Legeja salono malplena, kaj la konto inter polico kaj legejestraro. Vere nacio havas tragian agonion, kiam viLaĝa policisto kontestas en kulturaj aferoj eĉ de klerigministerio . . .

Genĉo Koprinkov agis kavalire, kiel afiŝanto, kiel tradukanto kaj kiel amiko. S-ro Kostadinov promenigis min tra aristokratejoj.

St. Zagora. Neniu al mi respondis. En la stacidomo mi demandas staciestron pri esp. fervojistoj. Neniu. Fine iu rememoras, ke la instruisto de la vira gimnazio s-ro Ĥristo Dimĉev parolas esperante. Mi atakas lin en malamika fronta fortifikaĵo, li sidas kaj ĝin gvidas „Aliance Française", sed kiel mi poste ekkonis, li estas jam ne plu kuraceblaentuziasmulo pri ĉiuj ismoj — turismo, francismo, pacifismo, esperantismo, vegetarismo kaj super ĉio brilanta animo de la ekzempla homo. Lernis esperanton en Stokholm pere de kelkaj ekzemplaj lecionoj laŭ la rekta metoda demonstrataj en abstinencula kongreso. La legejo „Teatro" agis strangege. Rifuzis ajnan helpon eĉ ŝajne penis malhelpon por paroladoj, ĉar post kelkaj tagoj oni intencis solene malfermi „Naroden universitet" kaj timis, ke mi forprenos la publikon aŭ dio scias kion. Eĉ por gelernantoj paroladoj devis okazi en kino, ĉar legeja salono — atendis postkelktagan solenaĵon. Eĉ por mono ne luis ĝin al la direktoroj de la gimuazio. Stranga strangaĵo!

Trevna. Unua loko, kie mi estis renkontita kaj bonvenata.

La legejestro, tre okupita ŝuvendisto, ekĝojis vidinte min kaj ekpostulis kvarônmilan sumon por la salono—mi dankis. La direktoroj sendis infanojn al progimnazia klasĉambro.

Drenovo. La invitinto inĝ. Nikolov forestis, sed la staciestro estis pli afabla ol iu ajn povis revi. Kvankam egaj malfavoraĵoj, parolado okazis kaj speciale venigita de Tirnovo s-ro V. Ŝiŝkov lertege tradukis.

Gabrovo. Ĝrandegaj afiŝoj informas min, ke mi estas profesoro de la Latva ŝtata universitato. Ho ve, la gabrovanoj sin montris tute aliaj ol ili estas konataj aliloke. Ĉio unuaklasa kaj solida. Kvankam oni ŝparis unu statuon de la ponto, kaj ankaŭ subbanigis aliajn, mi tamen spertis veran optimistan spiriton de gabrovanoj. Legejo eldonis afiŝojn,

hejtigis kaj lumigis salonon kaj kasisto transdonis al mi ĉiun enspezeron.

Sevlievo. Nia amiko kaj prez. de „Fratiga stelo“ s-ro S. Hesapĉiev jam maltrankvile atendis min. Okazis paroladoj. Mi gastis, babiladis kaj eĉ argumentadis pri . . . ventoj . . . La blankaj fratoj invitis min je tagmanĝo. Donacis eldonaĵkolekton. Tre afablaj samideanoj.

Tirnovo. La lulilo de esperanto estis plena de neĝo kaj koto. Paroladon tamen oni permesis al mi aranĝi, nur mi devis pagi por la salono, por afiŝoj, por tradukanto kaj verŝajne ankaŭ por aŭskultantoj. Alie mi devas sendi petskribon al estraro eble ili uzus mian senpagan servon por la pliriĉigado de la kaso.

Kilifarevo. Vidante sanktan profundan koton miksitan kun larmoj, sango kaj ŝvito de la bulgaroj, mi piede atingis ĝin. En plibeligejo de la vilaĝaj belulinoj „Esperanto“ mi jam trovis aron da verdbabilemuloj. Prelegon aŭskultis ankaŭ gedirektoroj de „Oblasten teatr“. Poste gastigado, babiloj, kafo, vino kaj nokto ĉe la plej „granda“ esperantisto.

G. Orehovica. Mia alveno estis simila al tiu de la impostisto — oni avertis min, ne veni, sed kiam mi venis, restis al ili nur kaŝiĝi . . . Tia teruriga mi estis.

Bela. Entuziasma akcepto de mia propono. La direktoro el fragmentoj de la ludiloj konstruas projekcio-aparaton. Publiko kolektiĝis antaŭtempe, kaj tradukanto ne venis. Direktoro proponas al mi paroli france. La instruistino de franca lingvo nerve rifuzas traduki; samon faras germanlingva instruisto. Eĉ de rusa lingvo direktoro mem ne povas traduki. Alvenas vilaĝano needukita, sed lerta esperantisto kaj moke diras al la direktoro — „Jen, s-ro direktoro, vi bezonas esperanton, kaj mi helpas al vi, estante vilaĝano, ĉar viaj lingvistoj ne povas vin helpi“... Unika okazintaĵo en mia verda sperto!

Ruse. „Espero“ aranĝas du prelegojn. Seninterkonsente ili anoncas ŝanĝitajn datojn. Tute malagrablaj klarigoj inter Ruse kaj Ŝumen, ĉar ambaŭ anoncis la saman daton. Aparato ne estas trovebla, tradukanto necerta . . . Okazas parolado. La traduko . . . publiko helpas, mi helpas, sed tamen ŝajne eliras io alia ol mi deziris diri — fiasko kaj bonega pruvo, ke esperanto estas ne taŭga lingvo por interkompreniĝo . . . Dua parolado ne povas okazi memkompreneble . . . Kiel gastigantoj rusĉukaj samideanoj estis nesupereblaj, malgraŭ mi perdis 500 levojn malgraŭ kompromitis esperanton, mi tamen restos ĉiam en serena rememoro pri persona gastineco.

Ŝumen. Ĉiuj aferoj, kiel bone ekzercitaj soldatoj laŭ komando de la subkolonelo s-ro Il. Silvestriev estas en perfekta ordo. La brila personeco, flegistina afableco kaj giganta erudicio de s-ro Silvestriev hipnotas ĉiujn. Kvar tagojn ni estis sur la postenoj — prelegoj sukcesis kaj, malgraŭ malmultnombra, publiko restis kontenta. Multaj miregis, ke ili neniam lernis esperanton, sed preskaŭ ĉion komprenis esperante.

Kneĵa. Renkontiĝo kun malnova konatulo la flegma s-ro Agro. Li invitas min por ripozo, sed mi malakceptas. Dum du horoj aranĝita parolado surprizas la legejestraron per sia neatendita sukceso. Poste ĝis 11-a ĉe junaj geesperantistoj en kurso gvidata de s-ro Milĉev. Oni pacience atendas min por vespermanĝo... Matene banejo en la elektra centralo; akompanas aro da gesamideanoj, fotografas, kaj mi treege bedaŭras, ke mi ne restis gasti pli longe . . .

B. Slatina. Hazarde iu promenanta samideano ekvidis verdan standardon kaj kondukas min al urbeto. Post tri horoj ni aranĝas eĉ du paroladojn en kinosalono lumigita nur per malgrandeta petrololampo. En tia mistika atmosfero publiko estis pli profunde impresita pri la sekretoj de jogi.

Oreĥovo. Varma invito. Naroden universitet aranĝas eĉ tri paroladojn. Direktoro de la gimnazio malkomentas. Eĉ adoptiĝante al liaj proponoj ni spertas trompon . . . Publiko neinteresiĝas. La kvara parolado estas decidata pri pli interesa temo. „Kama ŝutra, aŭ la scienco de la seksa amo kaj erotiko en Hindujo“. Same salono malplena. La materialo traktata estis troa por la publika parolado. La publiko kaj la tradukanto ŝvitis malgraŭ la salono estis sufiĉe malvarma. Oni diris, ke neniam oni aŭdis similan malkaŝecon — aplaŭdoj.

Červen breg. La legejestraro insistis, ke mi faru paroladon — mi faris, kvankam nur 18 personoj ĉeestis. Bona honorario feliĉe rezultis ke mia vojaĝado evitis monperdon . . .

* * *

Kaj tiel mi semis, kio el ĝi kreskos ni vidos. La senbrua ŝenreklama aŭ atakema ekspozado de nia lingvo certe vekis multe da simpatio inter la publiko. Anstataŭ agiti kaj instigadi, mi nur konstatadis la fakton de ekzisto kaj ĉiutaga uzebleco de esperanto. Tiuj, kiuj vere interesiĝas pri ĝi, venos serĉi nin; ni estu singardaj ne forpuŝu ilin, sed etendi fratan manon.

Samokaze mi esprimas profundajn dankojn al ĉiuj miaj bulgaraj amikoj, kiuj iamaniere helpis aŭ asistis min.

A. Poŝka.
Vaŝkai, Litovujo.

Sim. Hesapĉiev.

Kelkaj necesaj aranĝoj ĉe nia hejmo

Estas jam fakto kaj konstato, ke depost kiam la esperantista societo en Sofia posedas sian hejmon, la movado ne nur en la centro, sed ankaŭ malproksime de ĝi pliviglîĝis. Mi diris: „. . . la societo en Sofia posedas . . .“. Mi devas diri „la bulgara esperantistaro posedas sian hejmon en Sofia“, aŭ plej trafe: „la verdularo sub la ĉielo havas sian novan hejmon en Sofia“. Eble tiu ĉi fakto koincidis kun ĝenerala pliviglîĝo de nia movado, eble ĝi nur estis necesa por tio. Forta kaj sana koro batas forte, dissendas sangon al ĉiuj organoj kaj nutras ilin bone. Forta centro — forta movado en la periferio.

En la regulaj ĉiumerkredaj kunvenoj de la societo dum la forpasinta societa jaro ni vidis multajn malnovajn verdstelanojn, kiuj revenis en la movadon; ni aŭdis interesajn referatojn kaj paroladojn pri diversaj temoj; ni aranĝis kursojn kaj altiris novajn personojn; ni aranĝis ekskursojn bone vizititajn, en kiuj ni interkonatiĝis pli bone kaj manifestis nin kiel verdstelanojn antaŭ la socio;

Ni inter du ĉambroj la muron detruis . . . kaj faris belan, kvankam ne grandan saloneton, en kiu ni nun kunvenas, ĝi estas ankaŭ nia kursejo. Ni havas pli ol 20 seĝoj, sed ni bezonas ankoraŭ tiom eĉ pli.

La biblioteko. Laŭ Goete la libroj estas kapitalo, kiu senbrue disdonas grandegajn kaj nekalkuleblajn procentojn. Dum la pasinta jaro nia biblioteko efektive disdonis multajn procentojn kaj la kapitalo restis, sed . . . bedaŭrinde ni faris eraron, donante librojn al gastoj (hazardaj personoj), kiuj ne estis akurataj. La sperto en la antaŭa kaj en la proksima pasinteco instruas nin, ke nemembroj devas deponi certan sumon, kiam ili prunteprenas librojn.

Sed nia biblioteko estas tre malriĉa. Dum multaj jaroj, kiam la asocio kaj la societo ne havis hejmon — estis senhejmaj, multe da libroj forperdiĝis kaj eble neniu esploristo povus ilin retrovi. Tial estas nia devo severe gardi niajn librojn, sen kiuj al ni mankas unu brako. Ni sendas nian vokon al ĉiuj gesamideanoj kaj al la parencoj de la mortintaj gesamideanoj donaci por la biblioteko de la bulgara esperantista hejmo. La riĉeco kaj pli grave la uzado de la biblioteko estas indekso de niaj spiritaj interesoj kaj bezonoj.

Kelkaj dekoj da gazetoj estas ricevataj interŝanĝe je „Bulgara esperantisto“. Ilin regule enskribas en specaala listo la sekretario de BEA. Tiuj ĉi periodaĵoj multe pliriĉigas la bibliotekon, sed, bedaŭrinde, eĉ dum tiu ĉi jaro multaj jarkolektoj ne estas plenaj. Estas faritaj specialaj mapoj, en kiuj estas konservataj aparte la gazetoj. La lastaj numeroj de la gazetoj havos sian difinitan lokon sur speciala bretaro farota.

Ni ricevas interŝanĝe ankaŭ multajn bulgarajn periodaĵojn, precipe el la provinco. Ĉion oni konservas kaj kolektas.

Almenaŭ per sia biblioteko, kiu ne estu severe esperanta, sed plivasta, nia societo povas esti pli vaste kleriga. La samideanoj en Varna nomis sian societon kulturkleriga kaj eĉ . . . bonfara. Tre rekomendinde al ĉiuj societoj.

La biblioteko havas inventaran katalogon en bona ordo, necesa estas ankaŭ alfabeta kartoteka katalogo.

Inter la nemultaj libroj nun posedataj, ni vidas kelkajn malnovajn eldonaĵojn, kiuj estas jam maloftaĵoj kaj sekve—tre valoraj kiel: Lingvo internacia, Rondiranto k. a. Mi esperas, ke en la proksima estonteco ni havos grandan bibliotekon kaj plenan, almenaŭ koncerne la bulgarajn eldonaĵojn.

En speciala fako de la biblioteko, kiun oni devas ankaŭ serioze prizorgi, devas esti kolektataj afiŝoj kaj flugfolioj pri kongresoj, konferencoj, kursoj. paroladoj, ekskursoj, amuzoj k. s., kiuj servos kiel materialo pri la historio de nia movado. La societoj el la provinco regule sendadu tiajn.

En alia fako ni devus zorge kolekti artikolojn kaj menciojn pri esperanto kaj pri la vivo de la societoj el la ĉiutaga gazetaro kaj el la literaturo. Tiu ĉi materialo servos por subteni specialan rubrikon en „Bulgara esperantisto“.

Estas kreata speciala fako por turismo kaj vojaĝoj tra Bulgarujo. En ĝi estos gvidlibroj, gvidfolioj, prospektoj, afiŝoj, geografiaj kartoj, bildoj, fotoj, albumo kun: vidaĵoj de pitoreskaj, rimarkindaj kaj vidindaj lokoj en Bulgarujo, horaro de la vagonaroj k. a. s. Dum la lasta somero multaj diverslandaj samideanoj pasis tra ĉi tie, vizitis nin, bezonis niajn informojn kaj ricevis ilin. Por subteni tiun ĉi turistan fakon, ni devas konstante interrilati kun la speciala oficejo ĉe la Direkcio de la ŝtatfervojoj kun la Bulgara turista asocio kaj kun similaj organizaĵoj.

En la subtegmentejo ni havas ĉambreton kiu servos kiel deponejo de niaj malmultaj havaĵoj. Dum la somero ni plibonigis ĝin, ŝmiriginte la murojn per mortero kaj faris ĝin taŭga por loĝado. En ĝi estas liteto el tabuloj, sed estus bone havi ankaŭ litaĵojn, tableton ktp. Dum la venonta somero espereble ĝi fariĝos bona gastigejo por samideanoj, kiuj pasas tra Sofia.

Konstante kaj streĉe laborante, ni atingos ĉion ĉi tion, sed . . . ni ankoraŭ ne estas plenaj kaj absolutaj posedantoj de nia hejmo. Ni kolektis nur en Sofia pli ol 8000 lv. Venis ankaŭ el la provinco sumoj, sed pezas al ni, post parta pago dum septembro, ankoraŭ 10,000 levoj da ŝuldo. Ĝin ni konsideru ĉiam.

Poste ni deziros kaj havos ankaŭ radion, gramofonon kun specialaj diskoj, projekcian aparaton por paroladoj kun lumbildoj, telefonon sed antaŭ ĉio

Ni streĉu niajn fortojn!

XXIV-a bulgara esperanto-kongreso Pazarĝik

Karaj gesamideanoj!

Vi jam scias delonge, ke XXIV-a bulgara esperanto-kongreso okazos en Pazarĝik dum la 19—21 de junio 1937. jaro.

La pazarĝikaj geesperantistoj prenis sur sin la honoran taskon akcepti la XXIV-an nacian bulgaran kongreson kaj gastigi la bulgarajn kaj eksterlandajn geesperantistojn.

Delonge en Pazarĝik oni aŭdas pri esperanto, jam delonge ĉe ni ekzistas esperantista movado, kiu ne malmulte helpis en gravaj momentoj la esperantan movadon en Bulgario.

Dum 1937 ni havas la grandan honoron arangi la nacian esperanto-kongreson kaj ni estas fieraj kaj tre kontentaj. Ni pensas, ke por tiu-ĉi grandega honoro, ni dankos al la bulgaraj geesperantistoj, aranĝonte brile la kongreson. Pri tio-ĉi, ni certigas vin, tamen necese estas ankoraŭ via aliĝo kaj materiala apogo.

Aliĝante tuj, vi plenumos vian esperantan devon kaj venonte en Pazarĝik, vi havos grandan plezuron pasigi kelkajn tagojn inter gefratoj, viziti la vidindaĵojn de la urbo kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn.

Karaj gesamideanoj, sendu viajn aliĝilojn, donu vian materialan kaj moralan apogon, por ke ni aranĝu laŭeble plej brilan kaj imponan feston kaj manifestacion de vivanta esperantismo.

Pazarĝik atendas vin! Bonvenon!

Lokoko.

ИЗВЕСТИЯ НА ЦЕНТРАЛНИЯ КОМИТЕТЪ

На повика на централния комитетъ да се създаде *фондъ за пропаганда*, за съжаление, до сега се отзоваха само 8 или словомъ осемь души!

Този фактъ най-красноречиво говори за слабия интересъ къмъ организацията. У нашитѣ съидейници още не е узрѣло съзнанието, че тия 50 лева сѫ за подкрепа на дѣлото и то въ единъ решителенъ моментъ.

Централниятъ комитетъ, за да прибѣгне до идеята за създаване такъвъ фондъ, винаги се е натъквалъ при обсѫждане на всѣка полезна инициатива на най-важната прѣчка: липса на пари. А другъ би билъ въпросътъ, ако рѫководното тѣло на съюза разполагаше съ единъ фондъ, който да му развърже рѫцетѣ и му даде спокойствието да провежда всички добри инициативи и конгресни решения.

Прочее, съидейници, изпратете лептата си!

Да създадемъ фонда за пропаганда!

Внесли суми за фондъ „Пропаганда“:

1.	Атанасъ Д Атанасовъ	София	100 лв.
2.	Стефанъ Ганчевъ	„	100 „
3.	Тончо Цоневски	„	50 „
4.	Бѣлчо Т. Октомврийски	„	50 „
5.	Д-ръ Захари Захариевъ	„	50 „
6.	Стефанъ Кираджиевъ	„	50 „
7.	Иванъ Вълчановъ	„	50 „
8.	Любенъ Марикинъ	„	50 „

Всичко до 31.I.937. -- 500 лв.

***

Този брой се изпраща на всички познати съидейници и миналогодишни абонати. Умоляватъ се съидейницитѣ да си платятъ абонамента отъ 20 лева, или върнатъ списанието веднага въ редакцията.

Сумитѣ да се превеждатъ чрезъ пощенска чекова смѣтка на съюза № 1133. Тамъ, кѫдето нѣма т. п. станция, може да ни се изпращатъ пощенски марки.

***

Ni ĝoje sciigas pri la grava sukceso, kiun ni atingis ĉe la bulgaraj naciaj sendstacioj. Dank' al la klopodoj de la centra komitato de Bulgara esperantista asocio la estraro de la bulgaraj radiostacioj konsentis disaŭdigi 15-an de ĉiu monato je la 22·30 h. orienteŭropa tempo (21·30 mezeŭropa tempo) 15 minutojn esp. paroladon. Dissendos ĉiuj bulgaraj naciaj radio-stacioj nome:

Radio —

L.Z.A.	mallongaj ondoj		20.04 m.	1.5 kw.
Sofia	mezlongaj	„	352. 9 m.	1 kw.
Varna	„	„	235. 1 m.	2 kw.
St. Zagora	„	„	214. m.	2 kw.

Por ke ni, tamen, interesigu, la estraron de bulgaraj radio-stacioj pri la graveco de la esperanto-dissendoj, ni petas ĉiujn aŭskultantojn, ke ili sendu amase leterojn, petante pli oftajn dissendojn, al la adreso: Radio-stacio Sofia (Bulgario) str. Moskovska, 19.

Samideanoj, vi ne ŝparu la poŝtafrankon de unu poŝtkarto aŭ letero. Tio ja estas la sola vojo gajni por ĉiam niajn radio-staciojn kaj per tio antaŭenpuŝi kaj plivigligi la esperanto-movadon en nia lando.

***

La 16 jan 1937 okazis en Sofia konferenco de verkemaj esperantistoj, kun la tasko signi la vojon laŭ kiu principe devos esti redaktata la asocia organo „Bulgara esperantisto“, ellabori konkretan planon kaj distribui la laborojn.

La konferenco konstatis, ke la ĝisnuna redaktado estis sufiĉe altkvalita. Sed pro manko de kolektivo el kunlaborantoj kaj manko de redakta kolegio, la organo ne povis donadi al la enlanda kaj fremlanda legantaro pli plenan kaj diverspecan bildon de la kultura kaj ekonomia vivo de nia lando.

Oni fiksis jenajn konstantajn fakojn en la gazeto:

1. Gvidartikoloj. Gvidanto Ada.
2. Literaturo kaj arto (poezio, beletro, muziko, pentrado, teatro, kritiko, literatura kaj kultura vivo). Gvid. Stefan Kiraĝiev kaj Asen Grigorov.
3. Revuo de esp. gazetaro; recenzoj de esp. libroj. Gvid. St. Massârov.
4, Scienco (historio, medicino, pedagogio, juro k. a.) Gvid. d-ro Z. Zaĥariev.

5. Socia vivo (junula, virina, abstinencula k. a.) Gvid. d-ro Z. Zaĥariev.

6. Esperantista vivo. Alilandagvid. St. Massârov; enlanda — B. Oktomvrijski.

7. Lingvaj problemoj — Gvid. Emil Stratev.

8. Humoro — Gvid. Georgi Dimov.

Kiel redakta komitato estis elektitaj Oktomvrijski, Kiraĝiev kaj Massârov.

Kiel konstantaj kunlaborantoj estas ankoraŭ invititaj: P. Jordanov, L. Marikin, Iv. Vâlĉanov, St. Jonĉev, Iv. Dobrev, G. Hârŝev, A. Ivanov, Dim. Zlatarski, Sim. Hesapĉiev, V. Julzari, At. Atanasov (Agro), d-ro St. Ĝuĝev, d-ro D. Gavrijski, d-ro G. Gunĉev, prof. J. Todorov, G. Atanasov, Ĥr. Popov, inĝ. Nikola Raŝev, Zora Mladenova-Hans, St. Radev k. a.

La redakcio alpaŝos ankaŭ al teknika plibonigo kaj pliampleksigo de la gazeto, kaj ĝi alvokas la samideanojn pagi siajn abonojn laŭeble pli frue, ne atendante la finon de la jaro, por ke oni povu ĉiumonate eldoni la gazeton, unua tempe 12 paĝa kaj poste 16-paĝa.

Есперанто и международнитѣ панаири

Неуспоримъ фактъ е, че международниятъ езикъ есперанто се използува найуспѣшно въ всички отрасли на живота. Всички международни панаири отдавна вече използуватъ есперанто за съответнитѣ цели. Тукъ даваме статистическитѣ сведения на голѣмия межд. лионски панаиръ за кореспонденциитѣ, получени на есперанто презъ съответнитѣ месеци около откриването на панаира презъ годинитѣ 1933—34, 1934—35, 1935—36:

Страни	1.XII.-30.IV 1935—36	1,XII.-30.IV 1934—35	1.XII.-30.IV 1933—34
Холандия	93	46	67
Португалия	49	6	3
Япония	39	52	18
Швеция	32	26	18
Англия	27	18	4
Белгия	18	8	15
Чехословакия	18	19	24
Испания	16	9	6
Германия	15	20	18
България	24	16	8
Аржентина	9	0	0
Литва	9	1	0
Дания	7	6	1
Унгария	6	2	0
Финландия	5	0	0
Италия	5	2	4
Норвегия	5	0	1
Ромъния	5	1	0
Швейцария	4	1	0
Съв. съюзъ	4	4	3
Естония	3	2	4
Югославия	3	5	8
Алжиръ	2	1	1
Исландия	2	0	0
Летония	2	1	5
Полша	2	7	5
Австралия	1	1	0
Австрия	1	1	0
Бразилия	1	1	1
Гърция	1	0	1
Палестина	1	0	1
Урагвай	1	0	0
Съед. щати	1	4	1
О. Борнео	0	1	0
Индия	0	1	1
Канада	0	1	0
Всичко	401	265	227

СТАНЕТЕ ЧЛЕНОВЕ НА БЪЛГАРСКИЯ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗЪ!

Платете абонамента си!

При запитвания и справки за „Bulgara esperantisto“, посочвайте винаги абонаментния си нумеръ, който е отбелязанъ на адреса ви. Съ това ще улесните администрацията и ще получите по-бързо справката.

NIA VIVO

V. Kableŝkovo, Pomoria regiono. Ekbrilis nova verda steleto. Oni fondis novan societon, dank' al la iniciato de nia fervora samideano Zl. Zahariev. Elektita komitato: prez. Zl. Zahariev, vicprez G. At. Filipov, sekr G. Sivov, kas. G. D. Atanasov. bibl. St G Fenerov. Kontr. komitato: D. L. Vlahov, M. Dojĉev kaj Dim. p. Atanasov.

Loveĉ. Kurso por komencantoj gvidata de s-ano Dim. Ivanov el Ruse. Baldaŭ renovigos sian agadon societo „Espero", kiu ĝis nun letargiis.

Plovdiv. Je la 25 de oktobro okazis jarkunveno. Oni elektis novan komitaton: prez. Iv. Ŝivarov kaj sekr. kasisto T. Ajolov. Kontr. komitato: Iv. Ĝarov, B. Behar kaj D. Gramadnikov.

Ruse. La societo „Espero" en sia jarkunveno, kiu okazis je la 4 de novembro, elektis novan estraron: prez. Ang. Slavov, vicprez. D. Stojkov, sekr. M. Dimitrov, kas. P. Lazarova, bibl. Iurd. Vâlkova: Kontr. komitato: T. Ĉernev, Iv. Grozev kaj V. Pamukov.

— La societo malfermis dumonatan esperanto-kurson.

— Societo „Solidareco" post kelkmonata letargio pro manko de sekretario, kiu forestis dum 8 monatoj en Ameriko, denove, kiel antaŭe eklaboris entuziasme kaj vigle sur la esperanta batalkampo.

Dum la jarkunreno—la 14 an de decembro 1936 jaro—la solidarecanoj elektis novan estraron. Prez. St. Radev, vicprez. I. Klajner, sekr. Iv. Kovaĉev, kas. Dim. Naĉev, bibl. I. Nikolov, kons. Dim. Diolev kaj St. Bojaĝiev. Kont. komitato: K. Gagov, D. Mihajlov kaj D. Krâĉmarova.

— La 1—an de januaro la nova komitato luis novan societan klubejon, en kiu ĉiumerkrede je la 7—8 horo vespere kaj ĉiudimanĉe je la 10—11 h. matene okazas konversaciaj kunvenoj, dum kiuj oni legas, parolas kaj pritraktas diversajn temojn nur en pura esperanto.

— Por la Internacia konferenco esperantista, kiu okazos la 14—17-an de majo ĉijare en Parizo, la societo aranĝas karavanon, en kiu povas partopreni nur geesperantistoj.

Demandoj kaj aliĝoj al la sekretario Iv. Kovaĉev, str. Iv. Rilski 20,—Ruse.

Sofia. Nia societo faris konsiderindan laboron sur la kultur-kleriga kampo dum tiu-ĉi sezono. Post la sukcesa aperigo de la propaganda folio „*Прозорецъ къмъ свѣта*", kiu estis akceptata tre favore de la vasta neesperantista publiko, la societo okasigis en la salonego de „Uĉitelska kasa" publikan paroladon kun oratoroj: *d-ro Gavrijski, At. D. Atanasov* kaj *d-ro Zah. Zahariev*, kiuj bonege defendis kaj pritraktis la problemon pri lingvo internacia kaj speciale pri esperanto. S-ano Ada tre bone akcentis, ke: „*Esperanto estas la latina lingvo de la demo-kratio*" . . .

— Nun funkcias dek esperanto-kursoj: en esperanto-domo por progresintoj, gvidata de Em. Stratev, kaj por komencantoj, gvidata de G. Dimov; en legejo „Aŭra", gvidata de f-ino N. Petroviĉ; en legejo „Kiril i Metodij", gvidata de s ino Tr. Spasova; en legejo „Hr. Botev", gvidata de P. Velkov; ĉe la stacidomo, gvidata de Simeonov; en la domo de grafikaj laboristoj, gvidata de N. Klinzurov; en la klubejo de la abstinenculoj, gvidata de K. Draĵev; en la klubejo de la vegetaranoj, gvidata de St. Balev kaj en la Ŝtata blindula instituto, gvidata de blinda s-ano Kolev.

En ĉiuj 10 kursoj partoprenas ĉirkaŭ 300 gekursanoj.

— Ĉe la malfermoj de la kursoj la komisiitaj ges-anoj parolis antaŭ la kursanaro pri la signifo kaj esenco de esperanto kaj en legejoj „Botev", „Aŭra", „Kiril i Metodij", „P. Beron", okazis



Esperanto-kurso en Sevlievo
Gvidanto Dim. Karagjozov

paroladoj kun oratoroj B. Oktomvrijski, d-ro Z. Zaĥariev, f-ino Nadja Petroviĉ, kaj en la lasta legejo parolis P. Jordanov kaj B. Oktomvrijski.

— La 15-an de dec. okazis en legejo „Ĥr. Botev" Zamenhofa vesperfesto kun bona literatura kaj muzika programo.

— La 15-an de dec. parolis antaŭ mikrofono de radio-Sofia s-ano B. Oktomvrijski pri: „Bulgario—la lando de la rozoj".

— La 31-an de dec okazis en la domo amuzvespero kun improvizita tamen, tre bona programo. La ges-anoj kaj la venintaj gastoj amuziĝadis plej intime kaj en tre bona humoro ĝis la 4-a horo matene. Ĝuste je la meznokto okazis plej sinceraj kaj tutkoraj bondeziroj kaj gratulaj paroloj pri la nova jaro.

— Jam aperis n-ro 4 de nia murgazeto dediĉita al Varna kaj redaktita de nia varna-a s-ano *G. Dimov*. La enhavo estas tre varia kaj sprita. Frapas la okulojn la letero el Nederlando, kiu estas nekutime longa (4 maŝinskribitaj grandformataj paĝoj), tamen, tre interesa kaj leginda. N-ro 5-a, sub la redaktado de nia sekretario *B. Golemanov* estas en preparo kaj baldaŭ ornamos la murojn de nia domo.

— Estas legataj preskaŭ ĉiusemajne tre interesaj referatoj je temoj plej variaj. Ĉiumerkrede okazas la organizaj kunvenoj de nia societo.

— La 15 an de jan. okazis la dua radio-parolado. Parolis s-ano d-r o Z a ĥ. Z a ĥ a r i e v pri: „Unu impreso de Bulgario".

— La venontan 15-an — de februaro parolos antaŭ la mikrofono de radio Sofia nia tre dolĉe parolanta s-ano E m i l S t r a t e v. Ni atendas senpacience lian paroladon.

— En febra preparo nun estas la amuzvespero, kiu okazos la 6-an de febr. en la salono de „Koop". Estas elektitaj specialaj amuz — kaj loto komisionoj, kiuj priz rgos, kun la helpo de la ceteraj societanoj la plej bonan aranĝon de la vespero. La programo estas plej varia kaj interesplena. La loto promesas esti tre riĉa. La biletoj por la vespero jam estas vendataj. La ges-anoj de la proksimaj ĉe Sofia loĝlokoj estas kore invitataj nepre viziti nian amuzvesperon kaj pasigi inter ni kelkajn gajajn kaj bonhumorajn horojn. Ĝis nun jam multaj biletoj estas engaĝitaj.

Tirnovo. La societo malfermis kurson, gvidata de nia fervora s-ano V. Ŝiŝkov. Partoprenas 40 gekursanoj.

—Ĉiu-lunde la .societanoj kunveniĝas.

Varna. Sian agadon en la nova organiza jaro nia societo komencis tre vigle kaj entuziasme. Kvankam nia klubejo ne estas plu vizitata de fremdlandaj esperantistoj kaj multaj agemaj s-anoj kiel Skolufanova, Dimov, Nemec kaj aliaj forlasis la urbon, ĝiaj kunvenoj „V i v a g a z e t o" kaj daŭriga kurso ne estas malpli interesplenaj kaj efikaj, ol dum la somero.

Plej altan nivelon atingis la vigleco en la tagoj antaŭ la verda semajno, kiun ni fiksis de la 1—7 de novembro (ĉar ni deziris utiligi la radio-stacion en nia urbo por dissendado de poresperanta parolado, ni prokrastigis nian verdan semajnon kun sep tagoj—ĝis la 4 de novembro la radio-paroladoj estis okupitaj).

Dum tiuj tagoj de prepariĝado, daŭrintaj preskaŭ du semajnojn, nia klubejo similis al vera abelujo. Ĉiuvespere kunvenis pli ol 60—70 personoj kaj manifestis sian volon labori por nia movado. Kaj verŝajne, tiu fakto kaŭzis la unuan atencon kontraŭ nia klubejo, pri kio certe jam ĉiuj kleraj civitanoj eksciis el la ĵurnalaro.

La atenco okazis la 29-an de oktobro-tri tagoj antaŭ la komenco de nia verda semajno. Sed tio ne timigis nian samideanaron. Ni daŭrigis nian laboron.

— La 4-an de novembro estis dissendita per radio-stacio Varna parolado je temo: „E s p e r a n t o s e r v a s a l V a r n a k a j B u l g a r i o".

— La 5-an de novembro okazis en la klubejo esperantista vespero. Ĉeestis pli ol 70 personoj. Estis faritaj prelegoj — esperantaj kaj priesperantaj, estis legitaj originale esperantaj kaj tradukitaj versaĵoj.

— La 6-an de novembro en „Z a l a S â e d i n e n i e" okazis publika propagandkunveno en kiu parolis la prezidanto de la societo je temo: „L a r o l o d e e s p e r a n t o e n l a n u n t e m p a v i v o". Ĉeestis pli ol 200 aŭskultantoj.

Per sia propra konvikiga maniero s-ano Petrov substrekis la grandan neceson de internacia lingvo kaj pruvis la eblecon enkonduki ĝin en la vivon.

— La 7-an de novembro okazis literatura-amuzvespero kun bone preparita programo. Ni estis vizititaj de pli ol 250 personoj, kiuj havis la plezuron aŭdi nian himnon, plenumita de la ĥoro, organizita per la fortoj de esperantistoj kaj abstinuloj. Estis deklamitaj esperantaj kaj bulgaraj versaĵoj.

La verda semajno forpasis tre fruktodone. Nia regula laboro ree komencis.

— La 13-an de novembro ni malfermis du kursojn por komencantoj. Unu, gvidata en la klubejo, de s-ro Julzari, alia — en lernejo „Car Boris", gvidata de f-ino Ribolova; ilin partoprenis pli ol 70 kursanoj ĉe la malfermo.

— Kredeble nia vigla laborado treege malplaĉis al niaj kontraŭuloj — la atencistoj. La polico ne kaptis ilin la unuan fojon. Ili kuraĝis ankoraŭfoje atenci kontraŭ ni.

La dua atenco okazis la 8-an de decembro noktomeze, kiel la unua. Tiufoje la domaĝoj estis tre grandaj. La rulkurteno de la klubejo estas tute detruita, la pordo mem dispecigita, la vitroj de ĉiuj fenestroj rompitaj, samkiel la vitroj de ĉiuj kadroj en la klubejo. Pro la granda skuiĝo la fenestroj de multaj najbaraj konstruaĵoj ankaŭ rompiĝis.

Tiamaniere oni forprenis de ni la klubejon.

— Nun ni kunvenadas en la klubejo de unu sportista societo, sekcio de la abstinula organizacio. Tie ankaŭ estas gvidata la kurso por komencantoj.

— Niaj s-anoj restas fidelaj al la movado. Spite al ĉiuj provokoj ni daŭrigas nian laboradon, streĉante niajn fortojn kaj vicojn por la fina triumfo de nia ideo.

— Same malmulte el la kursanoj forlasis la kursojn. Se estas forlasintaj la kurson, tio okazis nur pro la nuna malproksimeco de la kursejo. La kunigita kurso el la du en la komenco nombras nun ĉirkaŭ 50 regulajn vizitantojn.

V. Vratca. Loveĉa regiono En nia vilaĝo oni malfermis esp.-kurson, kiun partoprenis 20 gekursanoj.

Ricevitaj presaĵoj.

Gazetoj:

Аптекарска защита. n-roj 9, 10, 11, 12 — Arbetar Esperantisten, n-roj 11, 12 — Argentina esperantisto, n-ro 126/127 — Aŭstria esperantisto, n-ro 1 — Belga esperantisto, n-ro 1 — Belga proleto, n-ro 8 — Братство, n-roj 173, 174, 175, 176, 177 — Bulteno de Aŭstria esperantista federacio, n-ro 1 — Bulteno de Esperanto-asocio en ĈSR, n-ro 6 — Bulteno de Internacia scienca asocio esperantista, n-ro 45 — Cosmoglotta, n-ro 111 — Cronache italiane del turismo, n-ro 103 — Ĉeĥoslovaka radio bulteno — Човѣкътъ, n-roj 3, 4 — Dansk Esperanto Blad, n-ro 12 — Ескулапъ, n-ro 2 — Esperanto, n-ro 432 — Esperantobladet, n-roj 9, 10 — Esperanto en la moderna vivo, n-roj 1, 2 — Esperanto internacia, n-roj 3, 4 — Esperanto venkas, n-roj 1, 2 — ETA-poŝtmark-albumo Iugoslavio 1921—1930, n-ro 1 — Fluganta skribilo. n-ro 93 — Frateca esperantista movado. n-ro 4 — Frateco, n-ro 9/10 — Franca esperantisto, n-roj 30, 31 — Generalitat de catalunya presidencia, n-ro 1 — Хасковски новини, n-ro 196 — Helena esperantisto, n-ro 38 — Heroldo de esperanto, n-roj 1, 2 — Informabulteno P. O. U. M., n-ro 3 — Informbulteno de C.N.T. kaj F.A.I. — Informoj de Esperanto-asocio de Estonio, n-ro 177/178 — Internacia, n-ro 2 — Internacia medicina revuo, n-ro 1/3—Internacia pedagogia revuo, n-ro 6—Internacia S. O. S. bulteno, n-ro 49 — Iugoslovenska P.T.T., n-roj 86, 87, 88/89 — La interligilo de l' P.T.T., n-ro 9/10 — La juna vivo — La kritika observanto, n-ro 1 — La lumo otienta, n-ro 3 — La mondo, n-ro 9/10 — La paco, n-ro 5 — La revuo orienta, n-roj 11, 12 — La torĉo de l'edukistoj, n-ro 5 — La vojo — L'esperanto — Le phare de l'esperanto, n-roj 67. 68 — Le travailleur esperantiste, n-roj 3, 4 — Lingvo-libro, n-ro 3 — Literatura mondo, n-roj 5, 6 — Litova stelo, n-ro 6 — Nia gazeto, n-roj 11, 12 — Nia Parolilo — Нива — Nordfranca esperantisto, n-ro 2 — Новъ животъ, n-roj 1, 2, 3 — Орфей. n-ro 2 — PEK belga bulteno, n-ro 9 — Pola esperantisto, n-roj 11, 12 — Popola fronto, n-ro 2 — Правда, n-roj 297, 298, 299, 300, 301, 302, 303—

Proleta voĉo, n-ro 7 — Renobasion, n-ro 3 — Ruĝa esperantisto, n-roj 55, 56 — Sennacieca revuo, n-ro 9 — Sennaciulo, n-roj 447, 448 — Suda kruceto, n-roj 18, 19 — Sur posteno n-roj 47, 48 — Svenska Esperanto-Tidningen la espero, n-ro 1 — Свѣтлоструй, n-roj 3, 4 — Tempo, n-roj 23, 24, 25 — The British Esperantist, n-ro 381 — Тракиецъ, n-roj 554, 555, 556, 557, 558, 559, 560 — Verda revuo, n-ro 1.

Libroj, broŝuroj k. a.:

Ключ Есперанто (rusa) G. Tupicina. Riga Volguntes felâ 10, dz. 2.

Nia Batalado, 100-paĝa ilustrita libro pri Litovujo kaj ĝia ĉefurbo Vilnius, estas senpage sendata al ĉiu petanto. Skribu al: „Vilniui Vaduoti S-ga, Kaunas, Litovujo".

Hispanujo. Elvoko al la pacifismo de H. Runham Brown.

Gvidilo tra la esperanto-movado de G. P. de Bruin. Dua eldono pli ampleksigita. 80 paĝoj. Formato 14 x 20 cm.— Eldono de S.A.T. 67 avenue Gambetta, Paris 20. kaj de Federacio de laboristaj esperantistoj en Nederlando, Postbus 0.50, Amsterdam.— 1936 — Prezo: 5,50 fr. fr., aŭ 0,50 guld. + 10 % por afranko.

Komunista manifesto, 3-a eldono. — Aŭtoroj: Karlo Marks kaj Frederiko Engels. Kun tre aktuala antaŭparolo de la konata ekonomiisto Lucien Lora (Revo). La lingvo de l'tria eldono estas zorge revizita. — 56 paĝoj, formato 12 x 18 cm. — Prezo: 3 fr. fr. plus 10 % por afranko.

Juneca ardo . . . originala rakonto de N. Bartelmes, kiu priskribas en romana formo la vivon de du junuloj el la jaroj post la mondmilito. 120 paĝoj, formato 13 x 19 cm., kun tutpaĝa titolbildo. Prezo: 7,50 fr. fr. plus 10% por afranko.

La laborista esperanto-movado antaŭ la mondmilito. Historia skizo de G. P. De Bruin.— Sobra stilo, klara prezent-maniero, pri temo, kiu devus interesi ĉiu esperantiston. 36 paĝoj, formato 14 x 20 cm. Prezo 4 fr. fr. plus 10% por afranko.

Frateco en la vivpraktiko. — Aŭtoro: Henrieta Roland Holst — v. d. Schalk. Tradukis H. A. Buis el la nederlanda lingvo. Prezento de la socia idealo de noble pensanta virino. 28 paĝoj, formato 11 x 15 cm. Prezo: 1,50 fr. fr. plus 10% por afranko.

Gaja ekzerco kaj amuzo de Carl Walter, Berlin W 35 Graf Spee-Str. 24. La libreto enhavas krom spritaĵoj, ŝercoj, parolekzercadoj kun bildoj ktp., versojn pri ĉiuj prefiksoj kaj sufiksoj kaj pri gravaj gramatikaĵoj.

100 pikantaj panŝmiraĵoj. Eldonaĵo de Ruhm Verlag. Wien VII. Museum-Strasse 3.

Ljubljana. 12-paĝa, riĉe ilustrita prospekto kelkkolora. Ricevebla senpage de Esperanto-klubo, Ljubljana-Jugoslavio.

Ĉeĥoslovakio. Turista prospekto prezentata Domica, Josov kaj Bielská. Senpage ricevebla de: Klub čs. turistů. Praha.

NIA POŜTO

M. T.— Tirnovo — Ne taŭgas por B. E.

Kain Tera, Varna — Traduku el bulgara literaturo.

Zefiro, Varna—Skribu vian adreson.



ДЖОБНИ
пропагандични
календарчета
„ЕСПЕРАНТО"
ЦЕНА 2 ЛЕВА
За поржчки отъ
10 екз.
и нагоре
по 1 левъ.
Поржчки
чрезъ съюза:
ул. Алабинъ, 50

NIAJ MORTINTOJ

La 7-an de februaro 1937 en Sofia mortis nia ŝatata samideanino

Lidija prof. Iv. Ŝiŝmanova

71 jaraĝa

naskiĝinta je 17 oktobro 1865. j. en Kiev-Ukrajno.

Lidija Ŝiŝmanova estas konata ĵurnalistino, literatur-muzika kritikistino, kiu partoprenas tre aktive en la virina movado en Bulgario. Ŝi estas edzino de la mortinta profesoro Iv. D. Ŝiŝmanov, konata al ĉiuj samideanoj kiel esp. pioniro.

La bulgara esperantistaro esprimas siajn kondolencojn.

La 9-an de oktobro 1936. en Sofia mortis

ILIJA S. BOBĈEV

advokato kaj publicisto, naskita en jaro 1873. Li estis la unua prezidanto de la esperantista klubo „Stelo“ en Plovdiv (1900 jaro) kaj kunlaboris en la redaktado de la gazeto „Rondiranto“, eldonita tiam de la nomita klubo.

Pacon al lia cindro!

La 22-an de oktobro 1936. jaro mortis en Ruse nia ŝatata samideanino, nia verda fratino

Elenka At. Djulgerova

20-jaraĝa

Kara Lena, vi foriras tiel frue el niaj vicoj, ĝuste kiam estas tiom necesa kaj valora ĉiu verda batalanto por paco kaj homeco.

Vian malplenan lokon, tamen, okupos aliaj entuziasmoplenaj batalantoj kaj ni persiste daŭrigos laŭ la vojo al pli helaj kaj feliĉaj tagoj.

Ripozu en paco, dum via eterna dormo, vi, kara verdfratin'!

LETERVESPERO! — LETERVESPERO!

La 17-an de marto n. j. Sofia societo okazigos en sia propra esperanto-domo letervesperon. En Sofia funkcias 10 esp.-kursoj kaj ties gekursanoj, dezirante praktiki la lingvon en korespondado, atendas kun tre granda intereso la letervesperon.

Gesamideanoj tutmondaj kaj enlandaj, amase skribu al ni leterojn pri temoj plej diversaj! Ĉiuj ricevos respondon kaj ankaŭ ekhavos seriozan korespondanton.

Skribu! — NEPRE SKRIBU!

Adreso: Esperanto-domo, Alabin 50, Sofia—Bulgario.

TAGE. la „Tutmonda asocio de geinstruistoj esperantistoj“, per cirkulero atentigas la instruistojn kaj instruistinojn esperantistojn pri la graveco de la asocio. Sub ĝia neŭtrala tegmento ili povus interrilatiĝi kun alilandaj gekolegoj kaj labori organize kaj plane por la disvastigado de esperanto ĉe la instruistoj kaj gelernantaj rondoj. Nur tiamaniere ili povus ebligi la efikan enkondukon de nia kara lingvo en la lernejon.

Bulgaraj geinstruistoj esperantistoj, fariĝu anoj de TAGE, fariĝu kunlaborantoj de „I.P.K.“ (Internacia pedagogia revuo)!

Petu senpagan specimenon de I.P.K. kaj detalajn klarigojn pri TAGE de s-ro P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando.

Aŭ: Ivan Vâlĉanov, str. Iskâr, 79 Sofia IV.

DEZIRAS KORESPONDI:

S-ro Dimĉo Vangelov, studento, v. Gorski izvor, Haskova regiono — kun en-kaj fremdlandaj gesamideanoj.

S-ro Todor Rjapov, entomologo, str. Evstati Pelagonijski, 6 — Sofia VI (Bulgario) — kun ĉiulandaj fakuloj pri insektoj. Interŝanĝas papiliojn. Korespondlingvoj: esperanto, rusa, franca, germana kaj angla. Respondo garantita.

Esperanto-presejo „KULTURA“ --- Sofia